


Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago №2, Februaro, 2009

*Kara leganto! Ni, same kiel Usono, staras ĉe la sojlo de ŝanĝoj: probable, de la sekvanta numero la bulteno havos alian redaktoron, la anticipa konsento jam estis atingita. Sed ĉi numeron aperigas la sama teamo, por kiu ĝuigita Leganto estas (kaj estis) pinto de feliĉo pro la nevana kaj utila laboro.*

*Araneo*

## S-ro Barak Obama: "Ni ŝanĝu!"

Saluton, karaj! Ĵus mi revizitis interret-paĝaron de nova, 44-a usona prezidento Barak Obama "Change. org", kaj unue mi ne povis kredi miajn okulojn. En la listo de la "Aldonaj ideoj" estas menciita Esperanto, ĝuste sur la 25-a loko!!! Tio signifas, ke ĉiu strebado plialtigi nian lokon neniam estis vana, ke ĉiu voĉdono vere gravis kaj kontribuis al tiu ĉi mirinda rezulto! Post tio oni povas esti tutcertaj ke jes, ni ja povas! Ĉu eble niaj samideanoj el Usona Esperanto-Asocio baldaŭ havos novaĵojn por ni? Feliĉe! Oleg, iniciinto de l' agado.

## UNESKO

Samtage, kiam ni festis naskiĝtagon de nia Majstro, en la sidejo de Unesko kun granda sukceso okazis la Zamenhof-taga konferenco. Sian opinion pri tio esprimis la nepo de la Kreinto Louis Zaleski-Zamenhof, kiu estis invitita fari prelegon pri sia avo. Kiel reprezentanto de la ĝenerala direktoro de Unesko, elpaŝis programspecialisto Mauro Rosi, kiu aparte dankis al UEA pro multlingvaj tradukoj de la mesaĝo flanke de la ĝenerala direktoro pri la Internacia Jaro de Lingvoj. La tuta aranĝo okazis en la franca kaj en Esperanto, kun samtempa interpretado ambaŭ direkte. Post la prelegoj okazis ankaŭ debato, dum kiu estis traktitaj demandoj pri la kulturo de Esperanto kaj pri ĝia instruado.



## Laste okazis..

Mi estas Ted Sanders, membro de "Nord-Illinoja Amikeca Forto" (Friendship Force of Northern Illinois (FFNI).

Nia loka FFNI estas filio de FFI-internacia – Tutmonda reto de kluboj, lokaj filioj kaj individuoj, kiuj movas antaŭen la FFI-an taskon por interkompreno tra la bariloj, disigataj Homaron. Oni faras tion, kunligante homojn el diversaj landoj sur persona nivelo. Kiam lokaj gastigantoj malfermas siajn hejmojn al vizitantoj el aliaj landoj kaj kulturoj, la vera interkompreno povas evolui, malgraŭ disdivido de nutraĵo, moroj, ĉiutagaj kutimoj ktp. Ekde sia fondiĝo en 1977 FFI kunligis milionojn homojn (vidu: www.thefriendshipforce.org).

Antaŭ kelkaj semajnoj mi kun la kolego pridiskutis la ŝanĝojn en FFI, kaj subite aperis nia demando pri la situo en Illinois. Post tio mi decidis esplori ties E-movadon. La decido kondukis min al E-societo de IL. Vizitinte la kunvenon, okazinta la 28-an de Januaro, mi parolis kun s-inoj G. Novak, T. Seastrom, kaj kun s-ro V. Pajuk, k.a., kiuj helpis al mi pli bone kompreni ideon de E-to kaj montris al mi la vojon por E-lernado en IL. Dankon al ili! Certe, mi kun la edzino tuj iĝos E-komencantoj. Jena esplorado konvinkis min pri tio, ke estus bone, se ankaŭ membroj de FFI eklernos E-ton.

*(Jen estas bonega ekzemplo de la apliko en IL.. FFI-internacia posedas ĉion, krom kompreni: ne multaj ordinaraj homoj, ekzemple en Turkio, Rusio, Vjetnamio, ktp. posedas la anglan. Ofte pro la potenca propaganda maŝino oni kontraŭas la instruadon de l' angla, tial kaj tie ni devas ek(kun)labori kaj enkonduki la IL-on,– Araneo).*

T. Sanders (per E-helpo de l'red.)

## KONGRESO DE ESPERANTO-USA

La vica kongreso de Esperanto-USA okazos en Sankta-Luiso (Misurio) la 22-25an de Majo, 2009 (la tri-taga semajnfino por Memoriga Tago).. Ĉefan temon de l' Kongreso "Kiel varbi Novan Generacion?" gvidos s-ro Boris Kolker – membro de Esperanto-Akademio, Honora Membro de UEA. Krome li respondos demandojn rilate al la lingvo kaj pri nuntempa stato de la Esperanto-movado. Vin atendos informplenaj prelegoj, neformalaj kunvenoj, interesaj diskutoj, la kutimaj oficialaj aranĝoj kaj bankedo. Bela hotelo Sheraton Westport Lakeside Chalet estas la sama, kie okazis la landa kongreso 1999-jare. Ekde la flughaveno ĝis la hotelo vin liveros senpagaj limuzinoj. Kaj kosto por loĝi en la hotelo estas modesta. Kaj maja vetero ĉi-regione favoros! Pasos ekskursoj al la fama Arkego, al mondkonata Botanika Ĝardeno, al la Zoologia parko kaj Art-Muzeo.



## Edukado.net

Nia paĝaro fariĝis 7-jara. Ni tre ĝojas, ke ni povas dividi tiun feston kun vi, raportante pri prospero kaj bonaj rezultoj. Dum tiu ĉi periodo en nia komunumo jam kolektiĝis 1778 personoj el 101 landoj. Multaj el ili regule uzas niajn servojn kaj estas helpataj en sia instrulaboro. Kolegoj (ĉirkaŭ duoncento) kontribuas nian agadon, proponante multon por la komuna uzo. Usona poresperanta fondaĵo ESF per dekmiloj da eŭroj financis la konstruon, kaj funkciigas nian mondskalan klerigservon.

### Adreso (provizora)

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor' Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/

**Estraro:**
Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

### MEMBROKOTIZO

Membro-subtenanto ; $40 jare;
Familia membro : $30, Regula: $20
Studenta aŭ pensiula: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn, 828 S. Ada St,
Chicago IL 60607

### KUNSIDO

**okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:**

Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101. Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

### Jen la informo pri niaj sekvantaj kunsidoj:

24an de Februaro – H. Dunant, samtempulo de L. Zamenhof, fondinto de l' Ruĝa Kruco, inf. G. Novak, MD
24an de Marto – Centjariĝo de E-eldonado en Ŝikago: pri historio kaj eldonplanoj prelegos V. Pajuk
28an de Junio – tradicia pikniko

